


# *La Riverego*

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia  
Aŭtuno de 1991. N<sup>o</sup> 24<sup>a</sup>. Jarkolekto 6<sup>a</sup> 0,50\$

## **L'espéranto est-il sexiste?**



# Enhavo

L'espéranto est-il sexiste? .....	p. 3
TEJO svedis kaj la L.K.K. preskaŭ svenis .....	p. 5
La Papago pliboniĝas .....	p. 6
Raporto pri la somera renkontiĝo de E.S.K. ....	p. 8
Kiel kompreni kunmetaĵojn .....	p. 9
Telefonrespondilo .....	p. 11
Malfermu vian pardon! .....	p. 12
Tra la mondo .....	p. 13
De stelo ĝis kverko .....	p. 15
Êtes-vous allé à Québec récemment .....	p. 16
Movadaj informoj .....	p. 17
Poemoj .....	p. 18



## *La Riverego*

**Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto**

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia.

Aperas trimonate. Eldonkvanto: 200

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair

Grafike aranĝis: Graphicom inc.

Kunlaboris Danielle Bédard, Suzanne Bolduc, Normand Fleury,

Patrice Mongeau kaj Jerry Veit.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K.

Por la aliaj: jara abono: 5\$ por mara sendo; 6\$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,50\$, plus sendokostoj.

**Limdato por la venonta numero: 1<sup>a</sup> de decembro de 1991**

**Esperanto-Societo Kebekia**

6358-A, rue de Bordeaux

MONTREAL

QUÉBEC

H2G 2R8

telefonrespondilo: (514) 272-0151



# L'espéranto est-il sexiste?

Sylvain Auclair

**Lors d'un cours d'espéranto, alors que j'enseignais le préfixe *ge-* (qui caractérise une réunion d'êtres des deux sexes), l'une des étudiants s'exclama que l'espéranto avait enfin trouvé la solution au problème du sexisme des langues. Il est en effet beaucoup plus élégant d'utiliser ce préfixe que de farcir un texte de *e* mis entre parenthèses.**

Pourquoi l'usage de ce préfixe est-il donc si restreint? À part quelques mots, tels que *gefratoj*, (frères et sœurs), on ne l'emploie pas de manière systématique. Une des réponses à cette question est qu'il ne peut s'employer, selon les règles, qu'au pluriel, laissant en suspend toute la question du genre «neutre»: un homme *ou* une femme.

En effet, si vous êtes souffrant et voulez rencontrer un médecin, dont le sexe vous indiffère, comment exprimer votre besoin en espéranto? La plupart diraient qu'ils veulent voir un *kuraciston*. Mais alors, si un *kuracisto* peut être autant une femme qu'un homme, comment exiger un médecin masculin? Pour un médecin féminin, il suffit de dire *kuracistino* et tout le monde comprend. Pour rencontrer un homme, faudra-t-il dire *vira kuracisto*?

La question a fait couler beaucoup d'encre. Selon certains, qui se basent sur des textes de Zamenhof, *kuracisto*

ne pourrait se dire que d'un homme. Si le sexe de votre soignant vous indiffère, vous devriez donc demander à voir *kuraciston aŭ kuracistinon*. Comme vous commencez à vous en douter, on retombe sur le même problème qu'en français et les textes officiels devraient parler de *prezidant(in)o*, etc.

Tout ce problème vient évidemment du fait que l'espéranto a déjà plus de cent ans, et que le rôle des femmes dans la société a beaucoup changé depuis. On retrouve maintenant des femmes dans la plupart des professions, de telle sorte que la connaissance du sexe d'un(e) professionnel(le) a peu d'importance. Mais, si le suffixe féminisant reste disponible, il n'existe pas de suffixe masculinisant...

## Quelques solutions

Les espérantistes étant des gens inventifs, parfois trop, chaque analyste

y va de sa solution. On retrouve fréquemment le suffixe *ge-* au singulier, mais son usage n'est jamais systématique et les formes «masculines» et «neutres» se confondent souvent. M. Rüdiger et Mme Vilma Eichholz, de l'Ontario, se sont élevés contre cet usage incorrect du préfixe *ge-* et ont proposé, dans un manuel d'apprentissage, le préfixe *go-*, qui signifie de l'un ou de l'autre sexe.

D'autres prennent le chemin inverse et proposent un suffixe masculinisant. Le plus fréquemment rencontré est *-iĉ-* (d'après *-in-* et par homologie avec les suffixes *-nj-* et *-ĉj-*). Les gens capricieux auraient donc le choix entre un *kuracistiĉo* et une *kuracistino*.

Selon d'autres, le suffixe *-in-* devrait tout simplement tomber en désuétude, sauf dans certains mots, principalement du domaine des relations familiales. On aurait donc le choix entre un *vira kuracisto* et une *ina kuracisto*. Remarquons que les deux dernières propositions laissent au mot sans suffixe ou sans adjectif une valeur neutre, alors que les précédentes, de manière moins symétrique, lui laisse une valeur masculine.

## Et les pronoms?

Le problème ne se rencontre pas que chez les noms. Les pronoms en souffrent également. Là-aussi, le pronom masculin *li* tend à représenter des êtres dont le sexe est inconnu. Dans une des *Lingvaj respondoj*, Zamenhof semblait appuyer l'usage du pronom neutre *ĝi*, tout en remarquant le peu d'empressement qu'ont certains de «rabaïsser» l'humain au rang de l'animal. Quoi qu'il en soit, on entend parfois *ĝi* dans ce sens, alors que d'autres s'en sortent par un emploi judicieux du pronom démonstratif *tiu*.

Bien sûr que l'on a, ici aussi, proposé

de nouveaux mots. Les plus répandus des pronoms signifiant un homme ou une femme (ou un mâle ou une femelle) sont, plus ou moins dans l'ordre, *ŝili*, *ŝli*, *pi* et *ri*. Mentionnons ici qu'il existe des langues, comme le hongrois, qui s'en tirent avec un seul pronom pour la troisième personne du singulier.

Au pluriel, le cas est plus simple, avec un seul pronom dont on s'accommode. Bien que certains, trouvant *ili* trop près de *li*, utilisent parfois *iŝi* quand le groupe est composé exclusivement (ou principalement) de femmes. Ce qui introduit le problème là où il n'existait pas...

Une langue totalement non-sexiste serait sans doute la bienvenue comme langue internationale. Or, l'espéranto possède les ressources nécessaires pour le devenir, à condition de pouvoir vaincre le poids de la tradition et les difficultés de la transition. Transition qui est déjà commencée.★

## Gag linguistique

Les ordinateurs, maintenant, font des traductions. Il y a quelques années, la technique n'était pas encore au point. Dans un ordinateur traducteur, on a introduit la formule célèbre *la chair est faible*, qu'on a fait traduire en anglais, puis de l'anglais au russe, puis du russe à l'arabe, puis de l'arabe au japonais et, enfin, du japonais au français. Et *la chair est faible*, en bout de course, est devenue *la viande est molle!*

[L'espéranto en marche, juin-juillet-août 1991]

# TEJO svedis kaj la L.K.K.\* preskaŭ svenis

Normand Fleury

*Participant du dernier congrès jeunesse et organisateur du prochain, Normand décrit rapidement le dernier congrès et présente les champs d'intérêt des jeunes espérantistes.*

Mi ĉeestis la 47<sup>an</sup> IJK-n de TEJO en Karlskoga, Svedio, ne nur kiel simpla kongresano sed ankaŭ pro la fakto, ke mi prezidas la venontan kongresan komitaton por la IJK 92 en Montrealo. Tiel, multaj gekongresanoj vidis min «spioni» ĉie dum la Sveda IJK. Mi klopodis ĉeesti ĉion mallonge por ekscii pri kio interesiĝas la junaj geesperantistoj. Mi tuj konkludu, ke la esperantistoj ne venas al la IJK pro preciza kialo. Fakte, ili venas pro tre diversaj kialoj. Mi tamen povus koncize diri, ke triono de la gekongresanoj ĉeestas la kongrestemajn prelegojn (la temo estis «Mondaj Movadoj»), sed kiam temas pri pli fakaj konsidoj (komputil-tradukado, radioelsendado) eĉ multe malpli ĉeestas. La kursoj pri la Sveda lingvo estis pli allogaj, kun meze dudeko da ĉeestantoj, ol la esperanta kurso, kun meze 10. La konversacia kaj interkona rondo, kun nur kelkaj babilemuloj, foje nuliĝis. Eblis multege babiladi kaj interkonatiĝi dum la kongreso, ĉar la programo ne tre plenis, do, kial ĉeesti tian rondon?

La gesovetianoj eluzis la eblecon aldoni ion al la programo per la prelegoj: *Esperanto-tendaroj en Sovetunio*, *Esperanto-instruado en Sovetunio*, *Gastu en Sovetia muziko*, k.t.p. Ili prezentis

ion interesan, spontan, foje tre distran, kaj ja certas, ke eventuala IJK en Sovetunio ne estus enua...

La vesperaj programoj (tiam plej multaj ĉeestis) konsistis ĉefe el koncertoj: *Amplifiki*, *Persone*, *Ĵomart* kaj *Nataŝa*; estis neniu teatraĵo. Ankaŭ okazis ludoj, kiel *Kuru! kuru!*, laŭ Kuba modelo) kaj *Ĉu vi jam provis malnodigi cent personojn?* Foje la vespera programo tro mallongis (Sveda vespero), sed certe ne pri tio kulpis la internacia adiaŭa vespero, kiu daŭrigadis ĝis post la noktomezo. Plej elstaraj eroj dum ĉi lasta vespero estis: *Manĝo malmola*, *Finna saŭno*, Nederlanda demandludo (tro longa), Korea tradicia danco, Sovetia televidelsenda skeĉo kaj internacia koruso.

Mi konkludu dirante, ke la malgranda kvar-ina L.K.K. certe multe penis por prepari ĉion. Ili malfrue transprenis la laboron de alia forfalinta L.K.K. Mi do gratulas ilin sincere ĉar la loko taŭgis, la manĝoj bongustis (almenaŭ laŭ Eŭrop-amerika vidpunkto) kaj cetere multaj gekongresanoj ankaŭ ŝatis la «ondajn movadojn» en la apuda lago.★

\*Loka Kongresa Komitato

## Svedaj I.J.K.-klačoj

• Oni anoncis en la programo Verkado de kongresa gazeto je la 9h30 matene. Fakte ĝi okazis 23h30 nokte kaj eĉ pli malfrue. Tamen la globulo, malgraŭ sia dumnokta verkado, ne enhavis tro da tajperaroj!

• La kongresa T-ĉemizo, kontraŭ nur 30 kronoj, estis ŝajne la plej vendita aĵo de la libroservo. Se vi kolektas ilin kaj ne ĉeestis la IJK-n, vi certe povas mendi de la Sveda Esperanto-Federacio.

• Kelkaj Azianoj taksis la malmult-vestemon (tiel estas nur pantalonetoj) de multaj Eŭropanoj, ne plej taŭga por

ĉeesto de prelegoj. Cetere, se almenaŭ ne estis piedodoroj!

• Ni havis nur 45 minutojn por vespermanĝi (inter 17h kaj 17h45). Imagu kiel suferis la Francoj kaj la Italoj, kiuj kutimas manĝi post la 20h vespere. Alia lando, alia kutimo.

• Eblis vere sane travivi la kongreson. Bonaj vegetaraj manĝoj, senfumadaj konstruaĵoj kaj senalkohola kongresejo. La nura restanta maniero pormistraktivian sanon, estis maldormi. Kaj mi certas, ke multaj gekongresanoj nur dormis po kelkajn horojn nokte...

## La Papago pliboniĝas

Patriko Monja



*La Papago (le perroquet) est un journal téléphonique espérantiste quotidien. On peut l'écouter et y contribuer en composant le (514) 270-0054. Pour des instructions en français, si vous avez un téléphone à tonalités, attendre que l'appareil réponde et composer #11 102.*

*Récemment, de nouveaux services se sont greffés à la Papago. En voici une présentation.*

Vi povas uzi la Papagon same tiel, kiel antaŭe. Sed vi nun povas fari multe pli per la Papago!

La Papago estas nun kompo kapabla respondi ĉe telefono. Krom aŭdigi ĉiu-

tagan esperantan gazeton, ĝi servas kiel tabulo. Tabulo estas loko, kie oni afiŝas mesaĝojn, legeblajn ĝis oni ilin elmetas. Ĝi enhavas ekzemple informojn pri la venontaj renkontiĝoj. Tiuj informoj estas haveblaj ĉiutage, sendepende de la gazeto.

En la gazeto, eblas nun salti al venonta kontribuo, kiam oni ne interesiĝas pri la temo de iu.

Baldaŭ eble aperos telefonaj leterkestoj por la uzantoj de la Papago. Kaj pliaj servoj eblas kaj venos. Se vi havas ideojn, vi eĉ povas ilin proponi al mi.

Jen kelkaj klarigoj pri la uzo de ĉiuj papagaj servoj. Cetere klarigoj estas afiŝitaj ankaŭ sur la tabulo de la Papago. Sed vi bezonas scii unue kiel aŭskulti la mesaĝojn de la tabulo, ĉu ne?

Kiam vi vokas la Papagon (kies telefonnumero estas (514) 270-0054), vi tuj aŭdas la tagan eldonon de la gazeto. Sed iam ajn, vi povas iri al la tabulo, aŭ reveni al la gazeto:

Premu **#11** por aŭskulti **la tabulon**.

Premu **#10** por aŭskulti **la gazeton**.

Ĉe la tabulo, vi unue aŭdos la paĝon 100. Premu **paĝnumeron** kaj vi aŭdos **tiun paĝon**. La afiŝoj de la tabulo nomiĝas paĝojn. Ili havas numeron inter 100 kaj 999.

Dum vi aŭskultas la gazeton, jen kelkaj novaj eblecoj:

Premu **1** por iri al **antaŭa kontribuo**.

Premu **3** por iri al **venonta kontribuo**.

Premu **01** por iri al la eldono de la **antaŭa tago**.

Premu **03** por reveni al la eldono de la **posta tago**.

Vi povas tiel aŭskulti la tagan eldonon, kaj la kvar antaŭajn.

Dum vi kontribuas al la Papago, jen kelkaj novaj eblecoj:

Premu \* por **fini la kontribuon** kaj pluaŭskulti la gazeton.

Premu **61** se vi estas malkontenta kaj volas **rezigni** vian kontribuon.

Premu **2** por **haltigi** surbendigadon por pensi **momente**.

Premu denove **2** por **daŭrigi**.

Jen parto de la enhavtabelo de la tabulo. Se vi ŝatus afiŝi sur la tabulon, aŭskultu unue la paĝon **111**.

paĝo	enhavo
100	ĝenerala prezento
101	esperanta enhavtabelo
102	présentation et table des matières en français
110	kiel uzi la Papagon
111	kiel uzi la tabulon
140	comment utiliser le Perroquet
141	comment utiliser le babillard
200	MEK (enhavtabelo)
201	venonta renkontiĝo
202	lasta raporto
210	ESK (enhavtabelo)
220	OEA (enhavtabelo)
300-	
328	telefonlibro de esperantistoj (petu, ke via nomo aperu!)★

## Senpaga numero de *Heroldo de Esperanto* !

Sufiĉas sendi poŝtkarton al la redakcio de *Heroldo de Esperanto* (adreso: Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio), por senpage ricevi ekzempleron de la duobla numero de la gazeto kun ilustrita raporto pri la U.K. en Bergen.

Kiel ĉiuj scias, la grand-formata *Heroldo de Esperanto*, fondita en 1920, de pli ol 70 jaroj estas la plej ofte aperanta kaj la plej populara internacia periodaĵo en la lingvo de Zamenhof.

# Raporto pri la somera renkontiĝo de E. S. K.

de Jerry Veit, Usono

*Commentaires d'un participant états-unien de la dernière rencontre de la S.Q.E., à Sainte-Catherine-de-Hatley. Il s'agissait de sa première rencontre espérantiste hors des États-Unis.*

Oni diras, ke Esperanto estas la internacia lingvo. Tamen, dum la unuaj ok jaroj de mia esperantisteco, mi neniam partoprenis veran internacian renkontiĝon de Esperantistoj, t.e. renkontiĝo ekster la landlimoj de Usono. Dum landaj aŭ regionaj kongresoj ene de Usono, mi ja agrable babilis Esperante kun miaj samlandaj samideanoj, tamen la celo de Esperanto certe ne estas faciligi (aŭ malfaciligi) la komunikadon inter tiuj, kiuj jam kundividas la saman gepatran lingvon.

Tial mi ĝojiĝis, kiam mi pere de anonceto en «*Esperanto USA*» eksciis pri la Somera Renkontiĝo de E.S.K. dum mezjuna semajnfino en la vilaĝo Sainte-Catherine-de-Hatley, nur malmultajn kilometrojn norde de la limo inter Kebekio kaj la ŝtato Vermont. La ESKanoj saĝe elektis tre trankvilan, belan lokon surborde de la lago Magog, je sufiĉa distanco fore de iaj urbegoj. La renkontiĝejo mem estis moderna multĉambra feria hejmo apartenanta al la Katolika Eklezio, kiu ŝajne uzas ĝin kiel ripozejon dum junularaj ekskursoj. Ĝi memorigis min pri la ŝparemaj, sed severe puraj junulgastejoj, en kiuj mi

kutimis tranokti dum studentaj vojaĝoj tra Germanio. Fakte, la studenta etoso estis tre sentebila tie, ĉar la plimulto de la partoprenantoj ŝajnis esti aŭ studentoj aŭ homoj ne tro foraj de siaj studentaj jaroj. Tio, cetere, estis frapa kontrasto al usonaj Esperanto-renkontiĝoj, kie ankoraŭ tre ofte regas Esperantistoj, kiuj jam antaŭ jardekoj travivis la tempon de juneco. Ĉu tio estas signo por tio, ke la kebekia junulara movado vigliĝis, dum tiu junulara movado en Usono ŝajne restas en profunda dormo? La renkontiĝejo ankaŭ havis bone ekipitan kuirejon, kie oni povis kuiru por si mem kaj tiamaniere ŝpari iom da mono dum la nuna kriza ekonomia situacio.

Tamen niaj du semajnfinaj tagoj en tia idilia ĉirkauaĵo ne estis tute paradizaj. Ŝajne regis la meteorologia principo, kiu postulas, ke nur povas plui tiam, kiam la homoj ferias. Fakte pluvetis, pluvis aŭ pluvegis dum preskaŭ nia tuta tempo en Kebekio, kun nur mallongaj periodoj de nepluvo. Mi supozas, ke ankaŭ super Kebekio ekzistas la blua ĉielo, tamen mi neniam vidis ĝin. Krome, la programo de lingvoludoj, muzikado kaj kantado



estas iomete anarkia laŭ mia burĝa mondkoncepto kaj povus esti pli bone ordigita venontfoje. Kelkaj partoprenantoj ŝajne havis problemon interrilati kun homoj, kiuj havas alian vivstilon ol ili kaj kiuj ne apartenas al la sama eta grupo (mi eĉ emus uzi la vorton «klando»). Sed eble tio estas ĝenerala manko de junaj homoj, kiuj ankoraŭ ne lernis interrilati kun la pli vasta homaro.

Tamen entute mi kaj mia familio (unu krokodilanta edzino kaj du antaŭ-Esperantistaj infanoj) tre ĝuis nian restadon inter la «internaciaj» samideanoj. Post kelkaj horoj mi ĉesis la provon diveni, kiuj estas franc-lingvanoj,

kiuj angla- aŭ ali-lingvaj, kaj mi profundiĝis en la etoso de vera sennacia Esperantujo. Fakte, kiam ni post du tagoj forlasis tiun malgrandan Esperantujon por resti ankoraŭ kelkajn tagojn en franclingva Kebekio inter «ordinaraj» homoj, ni havis la senton eniri novan landon kaj novan kulturon. Ni do havis la interesan sperton ĝui du kulturojn en Kebekio, unue la Esperantan, poste la franclingvan. Mi esperas, ke la kebekiaj samideanoj kunlaboros kun la Esperantistoj de Nov-Anglio kaj Usono kaj havos la okazon resti iom da tempo en tiu provinco de Esperantujo, kiu lokiĝas sude de la landlimo.★

## Kiel kompreni kunmetaĵojn

Patriko Monĵa

### *Quelques commentaires sur les règles de composition des mots.*

Zamenhofo uzis la vorton *centjaro*. Poste, iuj rimarkis, ke tiu vorto estas erara. Zamenhofo ne volis esprimi *jaro de cento* sed *cento de jaroj*. Tiel, la lingvuzo iĝis *jarcento*.

#### **Ĉefradika principo**

**La lasta radiko de kunmetaĵo estas la ĉefa; la aliaj limigas kaŭ precizigas.**

Tiel, vaporŝipo estas ŝipo, ŝufaristo estas faristo, faristo estas isto, kaj jarcento estas cento. Jarcento ne estas jaro. Tial oni ne pravus diri *centjaro*.

Ĉu tiu regulo pri kunmetado funkcias por vortoj aliaj ol o-vortoj? Ni studu kel-

kajn ekzemplojn. Io helblua estas io blua. Vaporŝipa ĉambro estas ŝipa ĉambro. Ĝis nun, ĉio glatas. Kion pri la jena frazo? *Kunportu la surtablan paperon*. Ĉu surtabla papero estas tabla papero? Nun al pli evidente neregula vorto. *La Riverego estas trimonata revuo*. La Riverego estas certe ne monata revuo, ĉu ne? Sed jen vorto, kiu tre similas *centjaro*. Ĉu la ĝusta vorto estus *monattria*? Laŭ la lingvuzo, ne. Fakte, la a-vorto *centjara* estas eĉ kutima. Ĝi signifas plej ofte *pli ol centjaraĝa*. Ankaŭ *jarcenta* ekzistas. Ĝia signifo malsamas kaj mapli utilas. Ĝi signifas *rilata al*

*jarcento*, kiel povas ekzemple esti statistiko.

La klarigo de la ekzisto de ambaŭ formoj: *jarcenta* kaj *centjara* estas laŭ mi la jena principo:

## Vortara principo

Kunmetaĵo akiras signifon precizan, kiun necesas vortare priskribi.

Ekzemple, unuavide, *vortaro* povus signifi *teksto*, anstataŭ *libro difinanta vortojn*. Kiu kreis la vorton *vortaro*, tiu decidis pri ĝia difino. Tiel, *jarcento* ne estas iu ajn cento de jaroj, sed nepre la unua cento post kristnasko, aŭ la dua cento post kristnasko, aŭ la unua antaŭ, k.t.p.. La cent jaroj de 1850 ĝis 1949 ne konsistigas *jarcenton*. Sed ili eble ja konsistigas centjaran periodon. Ĉu mi eĉ pravas diri *centjaron* anstataŭ *centjaran periodon*?

Bedaŭrinde, mia teorio fundamentiĝas sur la vortara principo, kiun sekvas nur aŭ ĉefe malnovaj vortoj. La vortoj, kiujn la esperantistoj kreas nun, ne havas signifon precizan, kiun necesas envortarigi, sed obeas plejofte la jenan:

## Elvoka principo

Kunmetaĵo signifas la ĝeneralan ideon nature ebligata de la kunmetataj radikoj.

Ekzemple, *akvopurigilo* estas iu ajn produkto aŭ maŝino kapabla purigi akvon. *Akvopurigilo* estas nova vorto, aŭ almenaŭ ne envortarigita. Male, *kudrilo* estas nepre eta pinta ilo, per kiu oni mane kudras. *Kudrilo* ne povas signifi *kudrmaŝino*, ĉar tiel oni decidis kaj vortare difinis antaŭ longe. *Kudrilo* estas ja malnova vorto.

Mi devas aldoni, ke ankaŭ mi pli ŝatas la novan principon ol la malnovan rilate la signifon de kunmetaĵoj. La malnova ne ŝparigas vortaron kaj longan

lernadon tiom, kiom la nova.

Ĉu vere? Male oni povas supozi, ke la nova ebligas kreadon nur de vortoj kun vastaj signifoj, tiel ke neologismoj necesos por ĉiu preciza signifo. Rimarku, ke en lingvo, oni bezonas kaj vortojn kun ĝeneralaj signifoj, kaj vortojn precizajn (aŭ plurvortajn esprimojn).

Ni analizu pli profunden la vortojn *jarcento* kaj *centjaro*. Mi jam bone klarigis, ke la vorto *jarcento* obeas la vortaran principon. Ĉu la vorto *centjaro* obeas la elvokan? Certe ne. Ĝi estas kiel la vorto *trimonata*, ĉe kiu ni jam faris analizon, kiu montras, ke ĝi eĉ ne obeas la ĉefradikan principon. La klarigo ĉifoje estas escepto al la ĉefradika principo (Estas ja esceptoj en Esperanto):

## Esceptoj al la ĉefradika principo

**Nombroj kaj prepozicioj aperas ĉe la komenco de kunmetaĵo, eĉ se ili estas la ĉefa radiko, por signifi tion, kion ili signifas nekunmetate, kaj samorde.**

Niaj a-vortaj ekzemploj estas *surtabla* kaj *trimonata*. Jen i-vorta ekzemplo: *surmeti*. Ĉe la i-vortoj, tamen, al mi ŝajnas samaj la signifoj de *surenmeti* kaj *mete suri*. Se *suri* ŝajnas sufiĉi al vi, tiam *metsuri* obeas la ĉefradikan principon. Ja *metsuri* estas *suri*. Vi do pravas. Sed *surmeti* ne obeas tiun ĉefradikan principon. Ĝi estas laŭ mi nebezona escepto, sed de longe enradikiĝinta en la esperantan lingvuzon.★

## Eraro

En la traduko de *La complainte du phoque en Alaska*, mankis la lasta verso. Jen ĝi:

Ankaŭ mia amata foriris.

# Telefonrespondilo<sup>1</sup>

«Bonan tagon<sup>2</sup>, Ernestina! Via<sup>3</sup> mesaĝo estas<sup>4</sup> tre originala kaj amuza!  
Mi daŭre<sup>5</sup> ridas! Ĉe la komenco<sup>6</sup>, mi tute ne<sup>7</sup> rekonis<sup>8</sup> vian voĉon<sup>9</sup>!

Mi telefonas al vi<sup>10</sup> por inviti vin<sup>11</sup> vespermanĝi<sup>12</sup> morgaŭ<sup>13</sup>. Venu  
ambaŭ<sup>14</sup>. Ni atendos vin du<sup>15</sup> je la sepa<sup>16</sup>. Kunportu nenion<sup>17</sup>. Venu nepre<sup>18</sup>!  
Ĝis morgaŭ<sup>19</sup>! Kison<sup>20</sup>!»

1- **ilo**=outil. **Telefon-respond-ilo**=outil pour répondre au téléphone= répondeur téléphonique.

2- **Bona tago**= une bonne journée. Dans le texte, on écrit **Bonan tagon** pour saluer, avec la finale **n** de l'accusatif (complément d'objet direct), parce qu'il est sous-entendu que l'on veut dire: «Je te souhaite le bonjour.» Je te souhaite quoi? le bonjour (complément d'objet direct).

3- La finale **a** indique toujours l'adjectif singulier. **Vi**=tu, vous. **Via** en est l'adjectif possessif dérivé: ton, ta, votre.

4- La terminaison **as** indique toujours un verbe au présent de l'indicatif. **Esti**= être. **Estas**= suis, es, est, sommes, êtes, sont, selon le sujet, car on ne conjugue pas les verbes. **Mi estas**= je suis; **vi estas**= tu es, vous êtes.

5- **Daŭri**=durer. **Mi daŭre ridas**= je ris avec durée= je ris encore. La finale **e** de **daŭre** indique l'adverbe, la manière.

6- **Ĉe la komenco**= au commencement.

7- **Tute ne**= en tout, non= pas du tout.

8- La finale **is** indique toujours un verbe au passé composé ou à l'imparfait. (complément direct, n).

9- **Via voĉo**= ta voix (sujet). Exemple: **Via voĉo estas bela**= ta voix (sujet) est belle. Dans le texte, **vian voĉon** n'est pas sujet mais complément d'objet direct, et prend donc la finale **n** de l'accusatif. Je n'ai pas du tout reconnu quoi? ta voix.

10- Je téléphone à qui? à toi. Il ne s'agit pas d'un complément direct, aussi écrit-on **al vi**= à toi.

11- Je te téléphone pour inviter qui? toi. Il s'agit maintenant d'un complément direct, qui

prend la finale **n** de l'accusatif.

12- **Vesper-manĝi**= manger le soir= souper.

13- **Morgaŭ**= demain; **hieraŭ**= hier; **hodiaŭ**= aujourd'hui.

14- La terminaison de verbe **u** (prononcer *ou*) indique l'impératif. **Veni**=venir. **Ambaŭ**= tous les deux.

15- La terminaison **os** indique toujours le futur. **Atendi**= attendre. Nous attendons qui? vous deux (complément direct, n).

16- **Sep**= sept. **Je la sepa**= à la septième (*heure*)= à sept heures.

17- **Kun-portu**= porte avec= apporte. **Nenio**= rien (sujet). Exemple: **Nenio funkcias**= rien ne fonctionne. **Kunportu nenion**= apporte quoi? rien (complément direct, n).

18- **Veni**=venir. **Nepre**= absolument.

19- **Ĝis**= jusqu'à. **Ĝis morgaŭ!**= jusqu'à demain= à demain!

20- **Kiso**= une bise, un baiser (sujet). Exemple: **Kiso estas donaco**= un baiser est un cadeau. Dans le texte on écrit **kison**, avec le **n** de l'accusatif, parce qu'il est sous-entendu que l'on veut dire: «Je t'envoie une bise». Je t'envoie quoi? une bise (complément direct, n).

En lisant à haute voix, soignez bien l'accent tonique, qui doit toujours tomber sur l'avant-dernière syllabe de chaque mot. La vague musicale de l'espéranto est en quelque sort à contretemps: ne parlez pas français et espéranto en même temps!

Pour de l'aide, vous pouvez nous appeler: (514) 523-1604. **Ĝis baldaŭ!** À bientôt!★

# Malfermu vian pordon!

de Normand Fleury

***Le comité organisateur du congrès jeunesse de 1992, à Montréal, invite les espérantistes nord-américains à recevoir chez eux les jeunes espérantistes qui voleront jusqu'à nous à cette occasion en devenant membre d'un réseau temporaire d'hébergement, sur le modèle du fameux Pasporta Servo.***

Dum julio kaj aŭgusto 1992, multaj gejunuloj el la tuta mondo kunvenos en Montrealo kadre de la 48<sup>a</sup> Internacia Junulara Kongreso (I.J.K.) de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Yves Bellefeuille el Otavo, Sylvain Auclair kaj mi el Montrealo ĉeestis la ĉi-jaran I.J.K.-on en Svedio. Ni varbis pri la kongreso en Montrealo kaj estis granda intereso. Tamen, flugi al Ameriko nur por unu semajno — tiom longe daŭras la I.J.K. — estus maltrafi la okazon viziti Kebekion, Kanadon kaj Usonon kaj konatiĝi kun la esperantistaro.

Tial ni invitas vin aliĝi al nia provizora Amerika Pasporta Servo. Se vi ŝatus senpage gastigi gejunulojn en via domo,

bonvolu do plenigi la demandaron. Se vi pretus gastigi esperantistojn ne nur dum la somero de 1992, tiam ne forgesu ankaŭ indiki tion.

Cetere, ne pensu, ke vi devas oferti luksan ĉambron, manĝojn aŭ servojn. Tute ne. Dormebleco eĉ surplanke sufiĉas se vi ne povas oferti pli. Vi eĉ povas peti pagon por la manĝoj, post interkonsento.

Imagu se Japanino, Norvego aŭ Germano vizitus vin en 1992. Tio estus por vi bona ebleco praktiki esperanton kaj vi samtempe helpus junajn esperantistojn malkovri vian urbon aŭ loĝlokon.

Mi sincere dankas vin, nome de la kongresa komitato.★





### **L'espéranto au Brésil**

L'espéranto est enseigné à partir du mois d'août à l'Université fédérale d'Alagoas (Brésil) à côté des autres langues inscrites au programme: l'anglais, le français, l'espagnol, l'allemand et le japonais. Ces cours, en trois niveaux, sont facultatifs. Ils dureront trois mois à raison de deux leçons de deux heures par semaine. Cette université est la sixième du Brésil à avoir introduit l'espéranto dans ses programmes d'enseignement.

[SAT-Amikaro, juillet 1991]

### **Plus vite au but avec l'espéranto...**

Directeur d'exportation et conseiller de la Chambre de commerce et de l'industrie de Nimègue (Pays-Bas), Krees Ruig a eu l'occasion de présenter une conférence sur l'espéranto à un groupe d'étudiants de l'université de Nimègue. Bien que choisis, entre autres critères, pour leur connaissance de l'anglais, ces étudiants éprouvent des difficultés à suivre les cours dans cette langue. C'est pourquoi, enthousiasmés par les qualités linguistiques de l'espéranto, ils ont demandé l'ouverture d'un cours «pour progresser plus rapidement», selon leur propre expression.

Aux Pays-Bas, où l'intrusion de l'anglais s'est effectuée sans résistance, son adoption commence à susciter une remise en question alors que le mal est

déjà fait.

[SAT-Amikaro, juillet 1991]

### **Un dictionnaire du commerce en 11 langues**

Paru en 1974 chez Kluwer, à Deventer (Pays-Bas), le Dictionnaire international du commerce et de l'économie en neuf langues a été réédité à Pékin. Le japonais et le chinois ont été ajoutés à l'espéranto, l'allemand, l'anglais, l'espagnol, le français, l'italien, le néerlandais, le portugais et le suédois. Les définitions des termes de cet ouvrage de 688 pages sont en anglais et en espéranto; les autres langues ne donnent que leur traduction. Il a été compilé à partir de l'espéranto par des spécialistes du commerce et de l'économie qui poursuivent le travail pour ajouter d'autres langues. La guerre Iran-Irak a empêché une édition avec le persan et l'arabe.

[SAT-Amikaro, juillet 1991]

### **Les entreprises européennes à la traîne**

De plus en plus d'entreprises de pays asiatiques et d'Europe de l'Est recherchent des partenaires occidentaux pour réaliser des échanges commerciaux; certaines sont en mesure d'utiliser l'espéranto comme langue commerciale. Ces demandes émanent surtout de Chine et de Corée, mais aussi de Pologne, de Hongrie, de Bulgarie, de Lituanie, d'Ukraine... Pendant ce temps, gênées par la bar-

rière des langues, des entreprises européennes laissent de larges parts de marché aux seuls pays pour lesquels la langue commerciale du moment est aussi leur propre langue, celle qui les avantage, c'est-à-dire l'anglais.

[SAT-Amikaro, juillet 1991]

### L'espéranto et la musique

La revue Esperanto a fait paraître, dans son numéro de juillet-août, un dossier spécial sur la musique et les musiciens espérantistes. On y présente des entrevues de huit groupes ou chanteurs, de la Suède au Japon, en passant par le Brésil.

### L'espéranto en Asie

Au cours des dernières années, les voyages asiatiques de Joachim Werdin (Pologne) et de Sabira Ståhlberg (Finlande) ont permis l'éclosion d'un grand nombre de groupes espérantistes en Asie. On pense même à la mise sur pied d'un centre asiatique d'espéranto et un premier congrès asiatique d'espéranto est prévu pour l'an prochain. Si vous êtes intéressés à contacter ces groupes, voici quelques adresses utiles:

Tajvana Esperantista Asocio  
Wang Chung-Yi  
No. 13, 2 Alley 40 Lane  
Chung Yung Street  
Shih Lin  
TAIPEI, TAIWAN.

Tajlanda Esperanto-Instituto  
S<sup>o</sup> Marcel Perray  
G.P.O. Box 1846  
BANGKOK 10501, THAILANDE.

Singapura Esperanto-Asocio  
Tanjong Pagar  
P.O.Box 0634  
SINGAPOUR 9109

Malajzia Esperanto-Asocio  
p/a Chan Sook Wai  
1008 Jalan Selesa 4  
58200 KUALA LUMPUR, MALAISIE.

Zainuddin Zakaria  
suite 147, the Merlin, 2  
Jalan Sultan Ismail  
50525 KUALA LUMPUR, MALAISIE.

Esperanto-Klubo de Honkongo  
c/o Margaret Fidow  
City Polytechnic Accountancy  
Department  
83 Tat Chee Avenue  
HONGKONG

S<sup>o</sup> Chhim Sokha  
Ministry of Finance  
Accountant Office  
Finance Secondary Education  
Kampuhea Viet Nam Street  
PHNOM PENH, CAMBODGE

Joachim Werdin  
ul. Pionierów 6/A9  
PL-47-220 KEDZIERZYN-KOZLE  
POLOGNE

Sabira Ståhlberg  
Pakilantie 9 A 3  
SF-00630 HELSINKI  
FINLANDE

[TEJO-Tutmonde, mai-juin 1991]★



# De stelo ĝis kverko

Sylvain Auclair

**Présentation de quelques nouvelles revues espérantistes: du pays basque, de lituanie, de Moscou et de l'Ukraine.**

**La mondo efektive ŝanĝiĝas, se juĝi laŭ la disflorado de la E-gazetaro. Jen kelkaj novaj kaj belaj burĝonoj:**

**Eŭska kverko**, organo de Eŭska E-Asocio. Mirigas tiu ĉi luksa eldonaĵo, grandformata kaj 20-paĝa, aperinta el landeto ĝis nun pli-malpli silenta en Esperantujo. Stile kaj enhance ĝi certe meritas vian subtenon. Abono (kvar numeroj) kostas 10 USD. Adreso:

Iñaki Velez  
Esperantista Grupo de Bilbo  
Barrenkale Barrena 7-1 dks.  
E-48005 BILBO, BIZKAIA  
ESPAGNE

**Litova stelo**, organo de Litova E-Asocio. Jen gazeto inda de unu el la plej fortaj landaj movadoj: belaspekta, riĉenhava, 32-paĝa. Abono (dek numeroj) kostas 20 guldenojn al UEA-konto litv-s. Adreso:

A.D.167  
233000 KAUNAS  
LITUANIE


**Moskva gazeto**, komuna organo de moskvaj esperantistoj. Finfine ni havas regulan ligilon (ses numeroj jare) kun unu el la ĉefurboj de Esperantujo. La nivelo —redakta, enhance— estas laŭa. Adreso:

Elena Ŝevĉenko  
ab. jaŝ. 428  
119048 MOSKVA  
UNION SOVIÉTIQUE

**Ukrainia esperantisto**, organo de Ukrainia E-Asocio. Malpli luksa aspekte sed same vigla enhance, tiu ĉi revuo donas enrigardon en la E-vivon kaj rapide evoluantan socian vivon de la due plej granda sovetia respubliko. Tie aperas ankaŭ la plej ofta E-bulteno en Sovetunio, *Informilo de UkrEA*. Petu provkzempleron ĉe:

Poŝtkesto 165  
252001 KIEV 1  
UKRAINE  
UNION SOVIÉTIQUE

[Esperanto, julio-aŭgusto 1991]★



## Ĉu vi vizitis Kebekon lastatempe?

### Êtes-vous allé à Québec récemment?

Kebeko dum la lastaj jaroj ŝanĝiĝis. Nun troviĝas tie kerno de novaj kaj pli malnovaj esperantistoj, kiuj certe sopiras pri kontaktoj. La Esperanto-Societo Kebekia lastfoje kongresis tie en 1983. La urbo ankaŭ riĉiĝis per la alveno de Muzeo pri civilizeco. Do, jen bonaj kialoj akcepti nian inviton kunveni ĉi-oktobre en la «Centre international de séjour» en Kebeko.

Kio: Amika semajnfina renkontiĝo de la membroj de E.S.K.

Kiam: la 26<sup>an</sup> kaj 27<sup>an</sup> de oktobro 1991

Kie: Centre international de séjour (junulargastejo), 19, rue Sainte-Ursule, Québec, tel.: (418) 694-0755 telekopiilo: (418) 694-2278

Vi estas kore bonvena, kune kun viaj geamikoj.★

Québec a changé, ces dernières années. On y trouve maintenant un noyau d'espérantistes, nouveaux ou plus anciens, qui désirent certainement plus de contacts. La S.Q.E. s'y est réunie pour la dernière fois en 1983. La ville s'est aussi enrichie du Musée de la civilisation. Voici donc deux bonnes raisons d'accepter notre invitation à une rencontre au Centre international de séjour de Québec.

Quoi: Rencontre amicale des membres de la S.Q.E.

Quand: Les 26 et 27 octobre 1991

Où: Centre international de séjour (auberge de jeunesse), 19, rue Sainte-Ursule, Québec, tél.: (418) 694-0755 téléc.: (418) 694-2278.

Vous êtes bienvenus, vous et vos ami-e-s.★

## Programo - Programme

### sabate

*matene:* alveno kaj enloĝiĝo  
*posttagmeze:* sinprezentado, lingva kurso, diskutrondo  
*vespere:* komuna manĝo kaj distra vespero

### dimanĉe

*matene:* lingva kurso, lingva ludo, diskutrondo  
*posttagmeze:* vizito al la Muzeo pri civilizeco (eniro ne inkluzivita)

### samedi

*matin:* arrivée  
*après-midi:* présentation, cours, discussion  
*soir:* repas et soirée animée

### dimanche

*matin:* cours, jeux, discussion  
*après-midi:* visite du Musée de la civilisation (entrée non incluse)



# Movadaj informoj

## Nouvelles du mouvement

Dum la ĝenerala kunsido de E.S.K., pasint-junie en Sainte-Catherine-de-Hatley, estis elektita nova estraro de E.S.K. Ĝi kompletigis dum sia unua kunsido, kaj nun konsistas el:

NORMAND FLEURY  
prezidanto

DANIELLE BÉDARD  
vic-prezidanto

SYLVAIN AUCLAIR  
sekretario-kasisto

TAMARA KOZIEJ KAJ YVON ROUX  
konsilantoj

Vous pouvez lire ci-haut les noms des membres du nouveau conseil d'administration de la Société québécoise d'espéranto, élu lors de la dernière assemblée générale, en juin dernier.

En E.S.K. nun anas 128 homoj. Sed ni posedas liston de preskaŭ 200 kromaj homoj, kiuj iam aŭ neniam membriĝis, kaj klopodas kontakti ilin.

La S.Q.E. compte maintenant 128 membres, mais nous commençons à recontacter les quelque 200 autres noms que nous avons en réserve.

Revigliĝas la Kanada Esperanto-Asocio. Nomiĝis nova estrarano, kiun prezidas Paul S. Hopkins kaj vicprezidas Normand Fleury (kiu deziris esti nure konsilanto...). Krom Normando, ŝajnas ke ĉiuj estraranoj loĝas sur la Vankuvera insulo... K.E.A.

kongresis en Nanaimo (BK) meze de aŭgusto, sed ni ricevis neniun informon el tio.

L'Association canadienne d'espéranto semble renaître. Un nouveau conseil s'est formé, avec Paul S. Hopkins à la présidence et Normand Fleury à la vice-présidence. Tous les membres du conseil, sauf Normand, seraient de l'île de Vancouver... L'A.C.E. a tenu un congrès au milieu d'août, à Nanaimo (C.-B.).★

Jus aperis la lasta listo de gastigantoj de Pasporta Servo. Ĝi estas havebla de la Libroservo kontraŭ naŭ dolaroj (plus sendokostoj).

**A**socio de Esperantistaj Handikapuloj (AEH) aranĝos de la 18<sup>a</sup> ĝis la 25<sup>a</sup> de julio 1992 la 1<sup>an</sup> Mondkongreson de Esperantistaj Handikapuloj en la fama banurbo Františkovy Lázně, Ĉeĥoslovakio, kie estis konstruita en la jaro 1914 la unua en mondo monumento de D<sup>ro</sup> L.L.Zamenhof.

Informojn petu kaj provizorajn aliĝojn sendu al Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, p.k.63, 274 01 Slany, Ĉeĥoslovakio. Limdato: 91.12.31.

**K**iel kutime, dum jarŝanĝo okazos en Germanio du semajnaj renkontiĝoj. La 35<sup>a</sup> Internacia Seminario de GEJ (Germana Esperanto-Junularo) celas ĉefe gejunulojn kaj okazos en Cuxhaven, kun la temo: *Ameriko: ĉu 500 jaroj de civilizacio aŭ koloniismo?* La Internacia Festivalo celas mezaĝulojn kaj okazos en Sensenstein (Kassel). Ambaŭ daŭros de la 27<sup>a</sup> de decembro ĝis la 3<sup>a</sup> de januaro. Adresoj ĉe E.S.K.

**L**a Internacia Komitato pri Etnaj Liberecoj (IKEL) alvokas la esperantistojn agi proteste al kruelaĵoj kontraŭ popoloj. Dum la lastaj monatoj, grandan danĝeron travivas Kroatoj, far Jugoslavia armeo kaj Serbaj armitaj bandoj, kaj Armenoj en Armenio kaj Montar-Karabaĥo (Armena regiono ene de Azerbajĝano), far Sovetia armeo kaj Azerbajĝana registaro. Vi povas sendi protestan leteron al la ambasadejoj kaj registaroj de la koncernaj landoj, kaj kopiojn de ili al la registaro de la perfortita popolo, al ties E-Asocio kaj al IKEL (precipe se vi uzas Esperanton). La adreso de IKEL:

**UWE JOACHIM MORITZ**  
*prezidanto de IKEL*  
Im Römerfeld 44  
D-W-5180 Eschweiler  
Germanio.

*Kio estas la doloro?*

*Bonvolu, diru al mi kion estas la doloro.*

*Diru, ĉu veras ke la doloro*

*estas perlo kiu moviĝas malrapide*

*kaj senkompate inter la faltetoj de la vizaĝo?*

*Diru al mi, ĉu ĝi vere estas tiu pala klingo*

*kiu tranĉas tiom severe la homan animon*

*kaj kiu kruele falĉas la ĵaluze gardatajn sonĝojn?*

*Bonvolu, diru al mi kio estas la doloro.*

*Ne timu havigi al mi animdoloron*

*malkaŝante ĉi-tiun malamikan kaj*

*tiom konatan sekreton.*

Verkinto nekonata.

Elitaligis Victor Epp

# Polucio

post l' UK en Braĵtono, 1989

Kris Long

Ŝtona, ŝtona  
strand' Braĵton-betona:  
rubo, ne marstelo,  
ladskatol', botelo  
...lote, lote  
glutas gorĝ' pilote

vastan, vastan  
marsurfacon plastan!  
Polietilena  
sako, pako ĝena;  
naĝe, naĝe  
sen kuraĝ', enkaĝe

[el *Penseo*, junio 1991]

Mi apartenas ĉiujn, mi apartenas  
neniun.  
Ne prenu ĉevalon per la kolhararo,  
Ne kaptu birdon per la flugiloj,  
Ne prenu min tenante mian koron en  
la manoj.  
Mi volas senti la varman senton de la  
libereco  
flugtuŝanta mian vizaĝon.  
Sciu atendi, ne malpacienca —  
Mi apartenas ĉiujn, mi apartenas  
neniun.  
Mi estas mia!


Verkinto nekonata.  
Elitaligis Victor Epp

Mi amas  
mi amas ĉiujn  
ĉar mi estas libera  
mi estas sklavo de mi mem  
mi estas la maro  
mi estas animo kiu vagas  
en la libero de la sentoj  
mi vivas, mi spiras mian vivon  
mi amas  
mi amas ĉiujn  
mi amas min mem

Verkinto nekonata.  
Elitaligis Victor Epp

Vi atendas ke eksonu tiu disko  
kiel vi atendas ke komencu via vivo.

Verkinto nekonata.  
Elitaligis Victor Epp



**Société québécoise d'espéranto**  
**Esperanto-Societo Kebekia**  
6358-A, rue de Bordeaux  
Montréal, Kebekio  
H2G 2R8

